# PREZIDANTA BULTENO

Universala Medicina Esperanto-Asocio | Fondita 1908 | Aliĝinta al UEA

## Jubileo de Medicina Internacia Revuo (MIR): 100 jarojn kaj - nova formato!

Laŭ decido de la eldonistoj okaze de la jubileo la formato de MIR estas ŝanĝita al DIN-A-4. Tiel ĝi kaj estas pli facile legebla kaj pli similas al la aspekto de kutimaj kaj altrangaj sciencaj ĵurnaloj. Bv. ne forgesi, ke daŭre estas konkurso por la plej bonaj medicinaj kazraportoj verkitaj rekte en Esperanto. Detalajn informojn vi trovos ĉe http://umea.fontoj.net/projektoj/.
La premio-sumoj estas inter 50 kaj 150 Eŭroj.

## Yumeiho-Sekcio daŭre kaj elstare aktivas







## Nova retejo de HYA

La retpaĝaro de la HYA estas bele renovigita. Nun ĝi estas plurlingva kaj tial ankaŭ legebla en Esperanto:

https://yumeiho.hu

Per la gvidado de Katarina Faragó kaj ŝia partopreno sukcesis multaj diversaj aranĝoj sur nacia hungara kaj internacia tereno. La supra foto sur la antaŭa paĝo montras la novelektitan prezidantaron de la Hungaria Yumeiho® Asocio:
s-ro Gyula BÓTA / 4 dan / prezidanto,
s-ino Krisztina LENGYEL / 5 dan / vicprezidantino,
s-ro Zoltán WILFING / 4 dan,
kaj meze staras s-ino Katarina Faragó, 6 dan Yumeiho® terapeŭto, Honora prezidanto de Hungaria Yumeiho® Asocio (HYA), fondinto de HYA 2000, kiu ricevis specialan donacon por sia laboro.
Elektita estis la nova estraro kadre de Somera Praktika Yumeiho® Tendaro en ripozejo KESZTÖLC, (fore de ĉefurbo Budapeŝto nur 40 kilometrojn).
La meza foto sur la antaŭa paĝo montras ĉiujn partoprenatojn de la aranĝo.
Laŭ raporto de majstrino Faragó en Hungario bone funkcias Yumeiho faka laboro, instruado kaj ekzamenoj. En marto okazis en urbo Hódmezővásárhely Internacia Yumeiho Praktika Konferenco, kiam ĉeestis el 8 landoj la partoprenintoj, eĉ la prezidanto de Internacia Yumeiho® Centro, s-ro Hisayuki OZAKI 7 dan, dr-o Maciej DLUSKI 7a dan, kaj 3 fakuloj de la 6 dan nivelo.
En aprilo 2024, okazinte en Tokió, Yumeiho® Internacia ekzamenon por 5 dan sukcese pasis 2 hungaraj personoj, kaj s-ino Katarina Faragó prelegis pri movorganaj malsanoj en infanaĝo.
Foto de la partoprenantoj estas la suba sur la antaŭa paĝo.
S-ino Katarina Faragó sukcese aplikas kaj praktikas Yumeiho-on ĉe virinoj por la gravedeco. En jaro 2024 naskiĝis la 152-a, 153-a kaj 154-a yumeiho beboj. En la mondo tiu rezulto estas elstara. UMEA rajtas fieri pri tiom sukcesa agado de sekcio.

## Bulteno pri GLAT-rajtoj

Informante pri GLAT-rajtoj en la mondo kaj kritikante la fakton, ke GLAT-rajtoj ne estas respektitaj en la lando de la ĉi-jara UK, atingis nin speciala eldono de „Forumo“, Bulteno de la Ligo de Seksemdiversaj Geesperantistoj. La ekzemplero estis porinforme dissendita al ĉiuj membroj de la UMEA.

## UMEA ĉe UK en Aruŝo, Tanzanio




UMEA estis sukcese reprezentita dum la 109-a UK en Tanzanio de d-ro Keyhan Sayadpour Zanjani, nia Landa Delegito de Irano. Aliĝis pro tiu nova membro, flegisto el Burundo. Nia antaŭ unu jaro, la 1-an de septembro 2023, forpasinta Honora Prezidanto, d-ro Imre Ferenczy, Honora Membro de la UEA ankaŭ, estis en Aruŝo honorigita tiamaniere, ke oni nomis salonon de la kongresejo laŭ li.

## Sancentro „Solidareco kaj Agado“ en Lukala, DR Kongo

Plej grava projekto de s-ro Malanda Lutete estis la Centro pri Prizorgado kaj Informo pri aidoso, seksaj transdonitaj infektoj, malario kaj tuberkulozo, nomita „Solidareco kaj Agado“, situita en la urbo Lukala, Provinco de Kongo Central (eks Bas-Congo).

Laŭ la firma konvinko de nia kara s-ano „Solidareco kaj Agado‘ kredas ke la vivoj de ĉiuj homoj havas la saman valoron kaj ĉiuj rajtas aliri al Aidoso-informoj kaj al la baza sanzorgado kiuj ili bezonas por havi sanan vivon. La centro ne celas profiton, sed celas helpi la komunumojn.“

Sinteno de vere aktiva, admirinda idealisto kaj Esperantisto.

## Forpasis nia Landa Delegito en DR Kongo, Jean Bosco Malanda Lutete (10.10.1970-26.7.2024)

El la rondoj de la Rotarianoj atingis nin la trista novaĵo, ke forpasis ne atendite la Landa Delegito de la UMEA en DR Kongo, Jean Bosco Malanda Lutete. Sube eltranĉo el la retejo de la Rotaria e-Klubo de Esperanto, Brazilo.

### FORPASIS NIA KARA KLUBANO JEAN BOSCO

8 08-02:00 AŬGUSTO 08-02:00 2024 PRESI MÍDIA IMPRESSA E DIGITAL 1 KOMENTO




Kun profunda malĝojo, la Rotaria Klubo Esperanto Brazilo anoncas la forpason de nia amata membro, Jean Bosco Malanda Lutete. Jean Bosco naskiĝis en Kongo kaj estis vigla kaj laborema membro de nia klubo, ĉiam dediĉita al la principoj de Rotario kaj al la disvastigado de Esperanto.

Dum sia tempo kun ni, Jean Bosco montris grandan pasion por la servado al la komunumo, ĉiam preta helpi kaj inspiri aliajn per sia ekzemplo kaj sindonemo. Lia pozitiva spirito kaj senlaca energio estos tre mankitaj de ĉiuj, kiuj havis la privilegion koni lin.

Jean Bosco forpasis pasintsemajne, lasante grandan truon en niaj koroj kaj en la koroj de ĉiuj, kiuj konis lin. Lia heredaĵo de servo kaj amikeco daŭre vivos en nia klubo kaj en la komunumo, kiun li tiel fervore servis.

Niajn plej sincerajn kondolencojn al la familio de Jean Bosco kaj al ĉiuj liaj amikoj. Ni ĉiam memoros lin kun granda estimo kaj dankemo.

Ripozu en paco, kara amiko.

## Trilingvaj tradukhelpiloj de la Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo (BMEF) - slovena versio haveblas

La Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo (BMEF) planas aranĝi virtualan, aŭtuno-salutantan kunvenon de BMEF la 4-an de septembro, merkrede. Ĉiuj estas invititaj kaj ricevos la enirinformojn pri la UMEA-dissendolisto.

BMEF ankaŭ daŭre tre sukcese aktivas rilate al la projekto de la trilingvaj medicinaj tradukhelpiloj, kiuj ja estas elŝuteblaj de http://umea.fontoj.net/projektoj/.
Pretas nun ankau slovena versio.

## Raportoj de la Landaj Delegitoj

**Elvis Hakizumwami, Demokratia Respubliko Kongo**
Elvis raportas:
„Bone mi fartas kaj miaj studoj bone evoluas. Nia staĝo jam komencis, ni iom post iom alproksimiĝas al la fino de niaj studoj malgraŭ ke kuracisto estas ĉiama studento. Li ĉiufoje devas havi aktualajn informojn pri medicino. Mi planas perfektigi min en interna medicino se tio eblos.
Pri la nuna sana situacio en mia provinco, ni frontas nin al nova epidemio de simia variolo. Ĝi jam mortigis pli ol 10 personojn en la najbara provinco de SUD KIVUO kaj oni jam enregistris pli ol 400 personoj kiuj estas infektitaj de tiu mortiga malsano. Nun, ni esperas ke tiu viruso ne atingu nian provincon de NORD KIVUO, kie ni havas multnombrajn rifuĝintojn kiuj vivas en malbonaj vivkondiĉoj en rifuĝejoj ĉirkaŭ la urbo GOMA, dum ni ne ankoraŭ haltis la epidemion de Ĥolero, kiu mortigas rifuĝintoj npro malpurecoj. Dank' al interveno de la Internacia Ruĝa Kruco ni esperas tutfini tiun epidemion.“
Elvis salutas ĉiujn samideanojn. Li ŝatus post baldaŭa fino de siaj studoj plulerni en francparolanta eŭropa lando. Do se vi havas kontaktojn aŭ povas mem akcepti lin por plia faka instruado, bv. kontakti lin senpere aŭ pere de la centra oficejo de la UMEA.

**D-ro Fredy Sucari, Peruo**
Fredy skribas:
„En mia lando mi pripensas la jenajn ideojn: Mi planas disvolvi, prezenti kaj integri praktikajn Esperanto-klasojn kiel libertempajn agadojn en la komunumo de kuracistoj, kiuj ĉesis sian oficon. Alia ideo, kiun mi pripensas, estas krei scienc-filozofian komunumon en la universitato, kie mi nuntempe laboras. Mi planas formi multfakan teamon por krei edukan projekton bazitan sur sciencaj pruvoj pri lingvo kaj lingvo-instruado. Temas pri projekto, kiu kovrus plurajn stadiojn de la vivo de la partoprenantoj: en la etapo de novnaskito ĝis 2 ĝis 4 jaroj de vivo, krei kompletan fonetikan alfabeton de ĉiuj homaj sonoj, kiuj ekzistas sur la planedo; en la fruaj ĝis malfruaj lernejaj jaroj, instruu ĉiun tipon de lingva sintakso per Esperanto, por ke en la estonteco ili povu facile ŝanĝi sintakson sen krei problemojn pri sia baza lingvo (almenaŭ 5 tipoj por la 5 labortagoj de la semajno) kun plifortigo de fonetiko jam klarigita aŭ profundigita; kaj en la universitata etapo, instrui per ekzempligoj uzante Esperanton kiel universalan peranton. Alia ideo, kiun mi havas, estas simple atendi, ke komputikistoj kaj kompanioj kun teknologia potenco kreu artefaritajn inteligentecojn kapablajn fari tradukojn de kompletaj libroj, inkluzive de la modifo de bildoj en la libroj, kaj kun la kapablo fari tradukojn de muzikfilmetoj, filmoj, sciencaj serioj, medicinaj serioj, komikaj serioj kaj kun logika sento al Esperanto sen perdi aŭ distordi iliajn specialajn efektojn. Kiam tiu tempo venos, mi planas aĉeti abonon por komenci ĉi tiun proceduron kaj krei grandan senpagan datumbazon en Esperanto....

## Projektoj de la UMEA

Bv. foje denove alrigardi la paĝon pri niaj diversaj projektoj

http://umea.fontoj.net/projektoj.

Ĉiuj respondeculoj kaj la dekstre cititaj LD ege ĝojus pri gekolegoj el la tuta mondo, kiuj ŝatus kunabori kaj tiel fortigus nian internacian reton.

Libroj pri malsamaj profesiaj karieroj estos disponeblaj por tuja uzo kaj distra materialo estos disponebla por kiaj ajn celoj estas konsiderataj taŭgaj.

Alia ideo, kiu trapasas mian kapon, estas la kreado de interŝanĝoj inter studentoj pri homa medicino el diversaj universitatoj, kreado de staĝoj kun universitata subteno. Alia tre simila estas la kreado de kulturaj interŝanĝoj por kuracistoj, kiuj ĉesis siajn devojn kaj faras interŝanĝojn en hospitaloj aŭ klinikoj. Kaj intera ideo estas la kreado de sekcio en PodCast pri medicino per Esperanto kun la fakuloj, kiujn ni havas, unue ĝi devus esti per renkontiĝoj, zoom aŭ jetsi, same kiel en la universalaj virtualaj Esperanto-kongresoj. Alia ideo, kiun mi havas kaj verŝajne faros ĉi-jare, estas la donaco de fotoj rekonstruitaj aŭ riparitaj per artefarita inteligenteco al la kulturdomo de mia urbo, kiu apartenas al la ministerio pri kulturo de mia lando, por promocii kaj prezenti Esperanton. Kiel ponto inter homoj de diversaj etnoj, religioj, ekonomiaj kondiĉoj, politikaj kondiĉoj kaj ĉefe diversaj landoj kaj iliaj lingvoj. Kaj eble peti esti delegito pri medicino de la Esperanto-komunumo por akiri iom pli da graveco kiam oni parolas kun miaj aŭtoritatoj."

D-ro Sucari estas nia Landa Delegito en Peruo kaj sekve rajtas reprezenti UMEA en sia lando. Se iu el vi ŝatas kunlabori kun d-ro Sucari pri unu el la planitaj projektoj kontaktu nin, ni petas.

Amikeco trans limoj